

PENSEO

N-ro 334

aŭg. / 2019

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Vejdo (Ĉinio)



Knabo dum rifuĝado

Kiam mi malfermis la okulojn,
kuŝas mi jam sur sablejo nuda.
Mi konscias, ke ĉi tien puŝis
ondoj maraj jen per forto kruda.
Mi ne scias, ĉu jam mi atingis
fremdan teron por la nova vivo,
ĉu eŭrop' akceptos min bonvole,
nu, por mia bona perspektivo.

Sed nun kie estas mia paĉjo,
miaj panjo kaj gefratoj tri?
Mi okule serĉas por eltrovi
ilin, ĉar ni estas famili'.
Malaperis ili sen ajna spuro.
Kie ili nun sin trovas, do?
Eble ili falis en marakvon
en pluvŝtormo furioza tro?

Mi ekdronas en paniko granda.
Tiujn scenojn de rifuĝ' mizera
mi vizie vidas en memoro.
Tiutage ni kun sent' despera
jen forlasis urĝe la hejmlokon,
kie brulas militfajro arde,
jen eksplodas bomboj jen pafkugloj
flugas sible ĉirkaŭ ni resalte.

Kune kun aliaj rifuĝintoj
ni hasteme piediris pene
al marbord' veturi per boato
el kaŭĉuko jam ŝarĝita plene
por vojaĝo longa sur la maro.

Ni flosadis tange kaj ŝancele
en direkt', laŭdire, al Eŭropo,
sed ni drivis tute ja sencele.

Kiom da tagnoktoj ni pasigis,
mi ne sciis. Ni nur preĝis pie
al la Di' por nia sekureco.
Tiutage vento blovis krie,
kaj nin pluvogutoj frapis forte.
La boat' skuiĝis violente,
alten kaj malalten saltis dance,
kvazaŭ renversigus ĉi-momente.

Mi kaj tri gefratoj ŝrikis laŭte,
panjo firme tenis nin je l' mano
kaj konsolis nin per mildaj vortoj,
paĉjo nin brakumis kun balzamo.
Hul' subite premis nin de alte,
kaj ni ĉiuj malsekiĝis plene.
Ond' alia ĵetis sin sur nin grupon,
kaj renversis la boaton ĝene.

Sinkis mi profunden en la maro,
ne sciante, kio trafis vere
ve, min kaj familianojn miajn.
Mi nur svage sentis min leĝere
fali kaj tuj poste elmergiĝi.
Mi flosadis sur la mar' en vento,
ond' min puŝis. Mi ne sciis, kien
alportiĝos mi en ĉi momento.



Mi revenas al kompleta memo:

mi soifas helpon de fremdulo,
 ĉu blankhaŭta ĉu la indiĝena,
 sed neniu homo sur insulo
 vidas min kaj aletendas manon.
 Mi ja strebas nur al mond' libera
 kaj trankvila vivo, Dio, ĉu ne?
 Ĉu vi ne fariĝas pli tolera?

**Ĉi poemo estas premiita per "honora mencio" en
 Belarta Konkurso 2019 de UEA*

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Ŝildo

Antaŭ ol mi forlasas hejmon,
 ĉu vespere, ĉu dumtage,
 unu guto da parfumo
 protektas min per mistero
 el disradiana ĝojo.

Juiz de Fora, 28/06/2019.

Eto (Ĉinio)

Aŭtuna amo

Tiujare ofte mi kun knabino
 ĉe bord' rigardis al la foro.
 Zefir' alblovis de l' ravino,
 krepusko flosis sur rivero,
 kaj l' luno jam aperis kun vang-klino.

En mia rememoro, la aŭtuno
 vualis distajn montojn.
 Ni staris, rigardante al subira suno,
 kun pala lum' de sun' sur nia korpo,
 estinta bildo flagris jen en nebulbrumo.

Mi prenis ŝian manon kun amemo,
 esprimis mian korinklinon duonvoĉe.
 Ŝi klinis sin al mi per korp-alpremo
 kaj kisis mian vangon mole kaj mi
 ĉirkaŭbrakumis ŝin kun ĝoja tremo.

Jen brulis mia haŭt' ĝisbole,
 ŝiaj lipoj longe al la miaj
 gluiĝis strikte kaj fervore.
 Ekblovis malvarmeta brizo
 tra la river' malhela jen defore.

Sed l' am' naskiĝis tre rapide,
 ĝi ankaŭ forgalopis tuje.
 Mi ŝin atendis kun sincer' avide,
 ŝi jame prenis al alia vir' la manon,
 foriris de brakumo mia ja perfide.



Fangfang (Ĉinio)

En pluva vetero

Nebule pluvas
 kvazaŭ soleco disvolviĝus.
 Ĝi malsekigas mian animstaton.
 Vole nevole devas mi iradi
 sur kota voj' senhalte
 por iluzion de solec' forigi.
 Pluveroj gutas sur korpon mian
 kaj jam senigas min je trankvileco.
 Spite al pluvobatoj kaj mebulfumo
 mi klopodadas ja antaŭeniri.
 Kvankam malsekas la memoro
 en malluma nokto,
 mi tamen kortuŝitas
 jen de folioj pluv-vipataj.

Viktoro (Ĉinio)

Mi tristis sola

La nokto tristis
 en lamplum' pigrema.
 La ridet' disfloras
 sur vizaĝoj ĉiuj
 kaj forvelkas poste.

Balmuziko skandas ritmon
kaj vipetas mian koron.

Nune mi ekpensas
pri la foraj kampoj.
Panj' akriĝas serpon
kun anksia sentimento.
Paĉj' revenas el la kampoj
kun tolŝuoj malseketaj
de roseroj noktaj.

En mallumon noktan
iras jen mi sola
kun eteraj paŝoj
eskapinte el la bala bruoj.
Mia tristo en ĉi-nokto
mincas, travideblas
kaj facile disrompeblas.
Nokta vento friska
ja purigas mian triston.

Kristin de Margenburg

foro flirtas

sur la reloj 7 ĝis 8
vomeme alternas trajnoj
ĵetiĝas alvenintoj
el la sufokigaj vagonoj

en la obstine morna violoj
griziĝas la vespera ĉielo
ĝoje brakumas sin
lacigitaj vojaĝantoj
kun atendintaj sopirfiguroj

ili kvazaŭ forsinkante
malaperas
senvorte
nokte
en nenion

kaj tie ŝteliras la krepusko
laŭ la perono

blovas al la enirantoj
bonfartvolupton sur la nukon

la pordoj almozpetas
pri pasaĝeroj
brue batas la vojaĝsopiro
sur la mekanismon
la klinko libero fermas ĝin

malantaŭ fenestro
mansvingas blankaj poŝtukoj
la lastan mesaĝon
tiam ankoraŭ rapida gratado
de koroj sur la vitron
jen vivraportoj telegramstile

ploro ruliĝas el via
adiaŭa vizaĝo

dum kriĉanta akra fajfsono
malaperas ruĝaj finlumoj
nebuligitaj sur la vizaĝoj
de la postrestintoj

la foro paliĝas

la proksimo eĉ pli proksimas

je la sekva fojo
mi kun-envagoniĝos.



Ernst Herbeck

Songô

La song', nur paper'
la song' nur noktkord'
jen venis pordist',
malfermant' de l' pord'

La songĝ' fariĝas lum'
la mort' jen la in'
la tag' estas songĝ'
kaj arbplongĝ' nun la songĝ'.

tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)

Sveta Konjashova (Rusio)



Dum suna mateno
Alvenis "Penseo".
Post kafo, krakeno—
Inspiro, rimkreo.

El Ĉina Antikva Poezio

Song Qi (998-1065)

Printempa pejzaĝo

—laŭ melodio *Printempo en jada pavilono*

Promenante oriente de la urbo,
sentas mi pli kaj pli bela
la pejzaĝon en printempo:
krispa akv' invitas al remado
sub sunlumo hela;
verdaj salikbranĉoj flirte
skuas sin pendole
en matennebul' leĝera;
ruĝaj floroj sur abrikotbranĉoj
ludas kun zefiro primavera.

Mi priplendas ĉiam
pokon de distriĝ' libera.
Kial mi domaĝas monon
por aĉeti ridon, jen en vera
senco, el la koro?

Mi persvadu al la suno surĉiela
per vintrinko ne subiri
sed prilumi florojn ja ĉe hor' vespera.

Song Qi (998-1065)

Ekskurso en printempo

—laŭ melodio *Satena vojo*
Hirundoj pepadas murmure
en la tagalum' pliiĝanta printempe.
Jen tempas ĝuste por ekskursi
plezure.
Rigardu: florar' en ĝardeno
disfloras por ĉarmo konkure,
jen kiel brodaĵo sur tolo.
Post pluv' spektakiloj* fajrbrule
skarlatas farbite per ruĝo.
Salikaj nov-vergoj susure
svingiĝas, maldikaj jen kiel la brovoj,
karese palpante homkapojn sku-lule.

Kantante, ni mano-en-mane ekskursas
sur herboj tapiŝaj velure.
Ebrias ni jam post vintrinko,
ankoraŭ ni serĉas des pli aventure
alian drinkejon por ĝuo.
Demandas ni al knabpaŝtisto,
li montras vilaĝon kor-pure:
"Profunde en la abrikota arbaro
la hejmo kampula tutcerte
la vinon enkelas nature."

*spektabilo: *Malus spectabilis*

Mei Yaochen (1002-1060)

Herboj

— laŭ melodio *Virina ĉapo*
Sur la digo herboj glimas kun rosoj,
domoj svagas en nebula vual',
malproksime soras ŝajna vaporo.
Post la pluvo la ĉielo serenas,
akvo klaras kiel kristal',
ĉie herboj verdaj vidiĝas.

Juna instruito en jovial’
portas robon junverdan,
kiu ja kongruas kun printempa verdpal’.

Herboj etendiĝas tre foren,
kunligante pavilonojn kun solidar’,
kaj plenkovras vojojn malorde.
La junulo eĉ forgesas en herb-ĝangal’
la limdaton de reir’ al hejmloko.
Tempo pasas kun pirflora finfal’,
kaj foriras printempo.
Ĉe krepusko pezas bruma spiral’,
kaj nebulo malheligas junverdon
de la herboj jen per svaga malklar’.



Yan Shu (991-1055)

Mi aŭskultas al kanzon’

—laŭ melodio *Silk-lava rojo*

Mi aŭskultas al kanzon’ kun nova teksto,
kun pokal’ da vin’ en mano senparola.
La veter’ ankoraŭ restas ja lastjara
kaj l’ malnova pavilono sam-dekora.
Kiam la impon’ de l’ subiranta suno
reaperos je ekzakta hor’ laŭvola?

Floroj velkas, falas vere laŭsezone
tute sendepende de l’ dezir’ popola.
La hirund’ reflugas ĵus al mia hejmo,
kiun ŝajne konas mi laŭ l’ flug’ petola.
Sur la pado de l’ ĝarden’ kun pompaj floroj
mi vagadas tien kaj ĉi tien sola.



Yan Shu (991-1055)

Tempo kaj homviv’ trafulmas

—laŭ melodio *Silk-lava rojo*

Tempo kaj homviv’ trafulmas
dum momento.
Plej facilas vekti la ĉagrenojn la disiĝo
kaj atendo.
Tuj ni eku drinki kaj orgii kaj diboĉi
jen sen pento.

Vi ja eksopiras al amikoj foraj
kiam vi, sur montsupro
per ascendo,
spektas belajn montojn kaj riverojn.
Ankaŭ naskas splenon kaj ĉagrenon
en la vento
florfalado simbolantan printemp-pason.
Ni preferu ĝui la festenon
ĝis kontento,
kaj favore trakti, ami gastojn.

elĉinigi

Vejdo (Ĉinio)

Mimoza Ahmeti (Albanio)



Reveninte tiujn noktojn

Reveninte tiujn noktojn
Reveninte sola, post la deka
Je la silento de la kvieta urbo,
Steloj foje estingiĝis, foje elstaris,
Lunon mi apenaŭ ekvidis,
La nuboj ĝermis,
tien-ĉi tien...

Reveninte sola tiujn horojn,
Kun la tremantaj tuŝetoj de la sento,
Sur la vizaĝo, buŝo, mano,
Kun la bluesko de la ombroj sub la

okuloj
 Oh, mi sentis la perdon postsekvantan
 min,...
 kiel ombro,
 kiel ombro,
 kiel ombro....

Homa horo

Ĉu vi volas min malgranda, etulo mia?
 Por vi malgranda dum momenteto mi fariĝas.

Ĉu vi volas min papilio, etulo mia?
 Papilio flirtanta ĉirkaŭ la lumo de la viaj
 okuloj
 Preta mi estas: papilio.

Ĉu vi volas min papilio, etulo mia?
 Por ke mi flugu laŭ viaj kapricoj?
 Nu bone. Fluger? Fluger.

Sed mi scias, etulo mia
 Alvenas la homa horo
 Kaj vi eksaltos trans la infana facileco
 Alportonte min la junulon.

Piedpremas vi sur la moderna vanteco
 Kaj tiam alportas la homon.
 Kaj tiam...
 Nek ni scias kio tiam okazos.
 La brusto plivastiĝas, la kvieto de la virino sur
 min enfalas
 En la akvaro de la artezia feliĉeco ni ambaŭ
 perdiĝas,
 Ni plonĝas,
 Ni sinkas,
 Ni vekigigas
 En nia senfina maro.
 Tiel denove mil fojojn...
 Estas ni tutveraj en ja veraj horoj.
 Estas ni veraj geedzoj,..
 Belaj romantikuloj en nia klopodo
 Varmo, brulo kaj odoro de la ardaĵ korpoj,
 Freŝeco de la mildaj kisoj.
 Ni estas tutveraj, veraj, veraj,

el karno, sango kaj revoj.

elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKNAŬA

Plena kompreno pri la vivo

§19-03

Kiam Konfuceo vojaĝis al la regno Chu, li vidis en arbaro maljunan ĝibulon, kiu kaptadis cikadojn per stango kun glueca ekstremaĵo tiel lerte, kvazaŭ li kolektus ilin per la mano.

“Vere lerta vi estas,” diris al li Konfuceo. “Ĉu vi havas specialan metodon?”

“Mi havas ian,” respondis la ĝibulo. “Jen la metodo: post kvin aŭ ses monatoj da ekzerciĝado, se mi metis du buletojn sur la pinton de la stango kaj ili ne falis, mi sciis, ke mi povas maltrafi ne multajn cikadojn. Se mi metis tri buletojn sur la pinton de la stango kaj ili ne falis, mi sciis, ke mi povas maltrafi ne pli ol unu el dek cikadoj. Se mi metis kvin buletojn sur la pinton de la stango kaj ili ne falis, mi sciis, ke mi povas kapti cikadojn tiel facile, kvazaŭ mi kolektus ilin per mia mano. Mi nun staras tiel firme, kiel arba trunko, kaj tenas mian brakon tiel senmove, kiel branĉo sekiĝinta. Meze de la senlima vasteco de la ĉielo kaj la tero, kun la multego da estaĵoj ĉirkaŭe, mi pensas pri nenio alia ol la cikadaĵ flugiloj. Mi estas tiel koncentrita, ke nenio povas deturni mian menson de sur la cikadaĵ flugiloj. Kiel do mi povus malsukcesi en

kaptado de la cikadoj?”

Konfuceo sin turnis al siaj disĉiploj kaj diris:

“La nedistriĝo nutras la sinkoncentradon.’ Ĉu tio ne estas dirata pri tiu ĉi maljuna ĝibulo?”

§19-04

Yan Hui demandis Konfuceon, dirante:

“Kiam mi transpasis la abismon Shangshen, la pramisto manipulis sian boaton kun mirinda lerteco. Mi demandis lin: ‘Ĉu tia lerteco estas lernebla?’ Li respondis: ‘Jes. Bona naĝanto povas ellerni ĝin tre baldaŭ. Bona plonĝanto povas ellerni ĝin eĉ se li neniam antaŭe vidis boaton.’ Mi petis pluan klarigon, sed li diris nenion pli. Ĉu vi povus diri al mi, kion signifas la parolo de la pramisto?”

“Bona naĝanto,” respondis Konfuceo, “povas ellerni ĝin tre baldaŭ, ĉar li jam forgesis la akvon kaj ĝian danĝeron. Bona plonĝanto povas ellerni ĝin eĉ se li neniam antaŭe vidis boaton, ĉar li rigardas la abismon kiel monteton kaj la renversiĝon de la pramo kiel la retroiro de ĉaro. Dekmiloj da tiaj scenoj lin tute ne influas, nek ĝenas. Kien ajn li iras, li restas en trankvileco. Tiu, kiu vetas per tegoloj, ludas kun lerteco; tiu, kiu vetas per arĝentaj bukoj, ludas kun maltrankvilo; tiu, kiu vetas per oro, ludas kun konfuziteco. Lia lerteco estas la sama, sed lia maltrankvilo kreskas kun la plivaloriĝo de la vetaĵo. Konsideroj pri eksteraj aferoj ĉiam mallertigas la homon en lia interno.”

§19-05

Kiam Tian Kaizhi iris vidi la dukon Wei de la regno Zhou, la duko diris:

“Mi aŭdis, ke Zhu Shen studas la manieron de la sankonservado kaj ke vi iam sekvis lin dum lia studovojaĝo. Ĉu vi aŭdis ion de li pri tio?”

“Kion mi povus diri al vi pri tio?” respondis Tian Kaizhi. “Tio, kion mi faras ĉe li, estas ne pli ol balaadi la korton per balailo.

Kiel mi povus lerni ion de mia majstro?”

“Ne estu modesta, majstro Tian,” diris la duko, “mi dezirus aŭdi ion pri tio.”

“Jen tio, kion mi aŭdis de mia majstro,” diris Tian Kaizhi. “Teni bonan sanon estas kiel teni aron da ŝafoj — ĉiam vipi la postiĝantajn!”

“kion do tio signifas?” demandis la duko.

“En la regno Lu,” respondis Tian Kaizhi, “iam vivi viro nomata Shan Bao, kiu loĝis en kaverno, trinkis malvarman akvon kaj neniam konkuris kun aliaj pri profito. En sia aĝo de sepdek jaroj li ankoraŭ konservis la junan freŝecon de infaneto. Malfeliĉe li hazarde renkontis malsatan tigron, kiu lin mortigis kaj formanĝis. Alia viro nomata Zhang Yi, kiu havis bonajn rilatojn kiel kun riĉuloj, tiel ankaŭ kun malriĉuloj, mortis de febro en la aĝo de kvardek jaroj. Shan Bao zorgis pri sia ekstera kulturado, sed lia fizika formo estis formanĝita de tigro. Zhang Yi zorgis pri sia ekstera konduto, sed malsano trafis lin de interne. La du viroj ambaŭ kulpis pri tio, ke ili ne vipis la postiĝantajn ŝafojn.”

Konfuceo diris:

“Ne tro profunde vin kaŝu, nek tro fanfarone vin elmontru. Staru senmove en la mezo kiel sekiĝinta arbo. Tiu, kiu sekvas tiujn ĉi tri regulojn, povas ĝui la plej altan renomon. Sur la danĝera vojo, kie unu el la dek vojaĝantoj povas esti mortigita, la gepatroj kaj la filoj kaj la fratoj avertas unu la aliajn, ke ili estu vigle atentaj kaj vojaĝu nepre kun granda grupo da vojkamaradoj. Ĉu ili ne estas sufiĉe prudentaj? Sed tio, kio estas la plej timinda por ĉiuj homoj en la mondo, estas la diboĉo en la lito kaj ĉe la tablo. Se ili ne donas al si avertojn kontraŭ tiu ĉi danĝero, ili faras eraron!”

elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Miric Jadranka (Serbio)



Malsekeco

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

De post pluv’
aperis suno.
Tuj altiĝis gradon je
tridek! Ĉi natur-puno
pezas je pulmo.

Videblas
Lun’ klara frue
ol ni atendis. Steloj
sur ĉiel’ brilis are,
eĉ tremas pare.

Frua nokt’
iom da freŝeco
sentas homoj surstrate
ĝojas en ĉi beleco.
Di’ senzorgeco!

Floretoj
bonodoras tre.
Plenas vazo de rozoj.
Diverskoloraj por ke
vi ĝuu kore!

Junia
varma mateno.
Estu sufoka tago
pro malsekec’. Elteno
pezas... Di-beno.

Tempesto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*


Aŭdiĝas
trajnofajfado.
Posttagmeza silento
malaperis. Bruado
de Foirrado.

Julia
varmego. Birdoj
kaŝitaj en branĉaro
atendas pluvon. Muŝoj
atakas. Fulmoj.

Aero
sufokas. Pluvas.
Ektondris forte. Fulmas.
Ekhajlis kvazaŭ neĝis.
Ĉie blankiĝis.

Klimata
ŝanĝiĝo timas.
Tondro frapis junulon
eĉ ŝafaron mortigis.
natur’ sovaĝas.

Tornado
en najbaro. Ve
Danĝero al neniuj
dezirata. Mira tre
rara vidaj’. Ve.



Ververa Platona amo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Dancas la
ĉiel’ kun steloj.

Briletas dia paco.
Luno krozas tra bluoj
de noktolumoj.

Ĉarmas nokt'.
Memoroj vekigās. Ho!
Kia sendorma nokto.
Flamas kandelo. Vakso
gutas je floro.

Blanka tuk'
Sur ĝi floreto.
Ruĝas rozo kiel am'.
Okulumu, koreto..
Pretas ĉareto.


Ekstere
trembrilas lumo.
Pendas lanteroj vice.
Ni gajigās. Festumo.
Fortas brakumo.

Estu ni
ebriaj de am'.
Valsaj akordoj glitas
aere por nia am'.
Tre prudenta am'.

Luiza CAROL (Israelo)

Sopiro en julio

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Birdidoj
ĝojasflugante,
soras super la parko,
ludas en sun' kantante,
pepas mirante.



Mandio (Ĉinio)

Senpenta herbeto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Herbeto
kreskanta ĉe voj'
subtretitas de homoj
kruele fojon post foj',
tamen sen malĝoj'.

Ĝi levas
kapon denove
kaj daŭre kreskas spite,
sin etendas plipove
kaj laŭbontrove.

Subite
sur ĝin falas ŝton'
kaj peze ĝin subpremas,
sed ĝi ne estas poltron'
kun ĝemkria son'.

Ĝi strebas
ŝoviĝi pene
el la ŝtona fendeto,
ĉu nokte ĉu matene,
vere senĝene.

Finfine
post la torturo
natura, ĝi ja sveltas
kaj rektas en ventlulo
jen kun plezuro.

Herbeto
kun eteta fort'
sub diversaj minacoj
ne cedas al mava sort'
trans demona mort'.

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
xa,xa,a (x=senrima).

v. RÓZSÁS János* (1926-2012)



Naskiĝtago

Mian dudek unuan naskiĝtagon mi travivis en la malproskima Nordo, en la praarbaro de Ural ĉe la supera fluo de la rivero Kama, la teritorio de Solikamsk, kie funkciis sennombraj puntendaroj kaj ĝia nomo estis Golovnaja en kiu mi estis, kie ni faris senarbigejon. Tiu tendaro estis ia centro inter la aliaj puntendaroj (GULAG) en la eksa Sovetio.

Tiu teritorio estis preskaŭ netrairebla kaj senfina praarbaro, ĝi tamen estis malproksime de la tundroj de Polusa Cirklo, sed ĝia malserena klimato por la tien ekzilitaj homoj de sudaj mondpartoj estis malfacile torolebla.

La tablomontaro de Ural situas alte, levigas super la marnivelo, tial konstante en ĉiuj sezonoj de la jaro estas pluvo kaj neĝnuboj kiuj kovras la ĉielon. Inter la montoj situas valoj kaj en ili estas marĉoj, ĝiaj elvaporigo kaj pro la konstanta atmosfera precipitaĵo de la akvo realiĝas tiun intenzivan hidrologian cirkuladon, ke dum la tuta jaro nur kelkaj tagoj heliĝas la ĉielo kaj oni povas vidi malmulte la Sunon. Povas esti, ke foje-foje estas nur videbla sunradioj trans la nebuloj, sed ili varmon ne donis. En la kurtaj someraj monatoj senĉese pluvetas, la vintro aspektas senfina kaj tiam seninterrompe neĝas. Plurmetraj estas la neĝokovrilo, kiu estas ege dura kaj blanke kovras la romatikan pejzaĝon, kaj ĉion. Somere la temperaturo estas inter plusaj 15-25 Celsiusaj gradoj, vintre atingas la minusajn 25-50 gradojn. Malofte ĝi atingas la minusajn 20 gradojn. Povas esti, ke la gradoj preskaŭ atingas la minusajn 60 gradojn, se la polusaj aer-ondoj ensalutas la teritorion.

Je tiu senkompate malgaja somero, laŭ mia rememoro, nia brigado okupiĝis per hakado kaj segado de brullignoj. Ni devis certigi la kontinuan provizon per brulmaterialoj la generatoron, kiu situis sur la monteto de eta vilaĝo kies nomon havis ankaŭ nia puntendaro. Tiu okupado por la tiel nomata nia invalida brigado – laŭ la esprimoj de la tendaroj – estis tiel nomita „facila laboro”. Dum tuta tago ni segadis, dispecigis la lignobranĉojn, kiujn oni por aliaj celoj ne povis uzi, ili en longaj stokoj tramalsekiĝis ĉe la piedo de la monto.

Je mia naskiĝtago: 1-an de aŭgusto, kiel ĉiam, sur la teritorio estis kuŝiganta la griza nebulo, per la ne perceptebla pluveto verŝis la humidon sur la vivaĵoj. La vento milde, sed tre malvarme svingiĝis.

Dum tiu tago, mi starante inter du lignostakoj, kun iu rusa knabo, ni segadis duope, la ruso estis rabisto kaj ol mi pli juna, kiu povus esti ĉ. 17 jaraĝa, ni segis la maldikajn branĉojn je duonmetra longeco. La humida malvarmeco trapenetris nian eluzitajn, ĉifonajn ventojakojn ĝis niajn ostojn, vane ni klopodis kurbiĝi kontraŭ la vento. Senvorte, rigardaĉe antaŭ nin, ni senforte tiregis tien-reen la longan segilon.

Dumtempe mi pensadis: je tiu aŭtuno – poste, ke mi trapaŝis mian dudek unuan jaraĝon –, en la unuaj tagoj de oktobro, mi devus hejme fortosane, junece soldatiĝi kune kun miaj samaĝuloj, kaj mi devus meti naciakoloran rubandon sur mian ĉapelon. Anstataŭ tio mi nun malsate, ĉifonite, preskaŭ mortinte, sed vive mi vivaĉas ĉi tie en iu fora fremda loko. Ankoraŭ ne estus certa ĉu mi atingos ĉi tie la oktobron, ĉar ni jam profunde eniras la vintron.

Miajn sombrajn kaj senesperigintajn pensojn mi devis en si mem sufoki, ĉar antaŭ la krimulo laŭ la publika juro – li estis poŝtelisto – mi ne mencius, ke hodiaŭ mi havas kian tagon... Vane ni baraktas kaj senpovadas kune en sama sorto je ambaŭa

flanko de la segostablo, li tute ne komprenus, pri kio mi parolus!

Laŭ lia mondo kaj mia mondo, nur la nivelo de la mizereco estas sama. Niaj memoraĵoj, deziroj, aŭ revoj kaj esperoj dorlotas el tute aliaj radikoj.

Mia revanta rigardo, hazarde ĵetiĝis al la fino de la lignostako, kie komenciĝis la granda ampleksa marĉo. En la mezo de la marĉo, neatingebla marĉejo, proksime al ni, el la mezo de la perfida verdaĵtapiŝo elkreskiĝis unu – ĝia formo estis kiel ĵetlancapinto – lila grapola floro. Ĝi estis la unua floro, kiun mi ĉi tie norden ekrigardis post longa tempo.

Ekbategis mia koro, kaj tuj min ektranĉigis: – mi ricevis floron je mia naskiĝtago!

Dumtempe, mi plurfoje ĵetis al ĝi mian rigardon, kaj ĉiomfoje entranĉis min la sento: Tiun floron sendis al mi la bona Dio, kiel konsolon! Ĉar tiu soleca floro nur por mi burĝoniĝis, nur por mi kliniĝadis en la vento.

Por mi ne estis ebla eniri por ĝi la marĉon, ke mi ĝin deŝiru, ekflaru, karesadu. Mi por eterne enmarĉiĝus sub la perfida vegetaĵo. Nur de malproksimo mi povis plezurigi mian floron ĝis ne alvenis la norda fruvespero. La fajfado de la gardistoj signis la finon de la labortago. Rapide ni transdonis la matene ricevitajn laborilojn. Duope en vicoj kun mia brigado, mi marŝadis sur la digo de industria fervojo al nia baraktendaro, kiun ĉirkaŭprenis pikdratbarilo per altaj gardoturoj. Post kiam oni kontrolis nin, ĉu ĉiu alvenis, poste ni rajtis enpaŝi la puntendaron. Ni tre rapidis al nia malpura, sen litaĵa tabulkuŝejon kaj nia loĝloko estis ŝtopita, kie ricevis nia brigado la kuŝejeblecon.

Mi enmiksiĝis en la amason la eterne svarmanta, senpaca kaj pri io ĉiam diskutantaj malliberulojn. Mi ne havis unu samlandanon, nek mi havis unu amikon, al kiu mi povus diri mian koron varmigantan travivaĵon kun la soleca floro. Post la verspersignalo mi rapidante enlitiĝis sub mian humidan

ventojakon. Pro la elĉerpiĝo kaj malforteco de la malsato tuj mi ekdomis sur la simplaj duraj tabuloj.

Tiel, baldaŭ, mi povis hejmeniri sur la flugiloj de la sonĝo al mia bela Hungario. Mi marŝadis sur flortapiŝoj kovritaj, de zorgaj insektoj zumataj herbejoj, mian vizaĝon mi povis meti al la karesaj sunradioj... kaj min vekis abrupte la frumatena akra sono de la relofero, kiun oni batis per martelo sur la korto de la puntendaro, kaj tiu aŭrora vekigo subite malkovris min je la kruela realeco: mi estas en fremda loko, mi vekigis je pli nova terura tago en la tiel aspekta senfina sklaveco...

Esperantigis



v. Szabadi Tibor

(Hungario)

Cao Naiqian

En kavo de stako el avenpajlo

Estis silente sub la ĉielo. La luno prilumis la grensunumejon blanke. En la flanko de la stako el avenpajlo, fronte al la luno, li kaj ŝi faris kavon.

“Vi eniru.”

“Vi eniru.”

“Do ni kune eniru.”

Kiam li kaj ŝi kune enŝovis sin en la kavon, tiu kavo malrapide enfalis kaj la pajlo kovris ilin malpeze.

Li alte levis siajn brakojn por subteni la enfalintan pajl-plafonon.

“Ne zorgu pri tio. Estas bone esti tiel, ĉu ne?” ŝi buliĝis en lia sino kaj diris.



